

STARTO

N-ro 3/2016 (260)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



foto Jaroslav Liška

Universala Kongreso de Esperanto okazis en Nitra 23–30 julio 2016
Ĉeĥaj esperantistoj antaŭ la kongresejo

Tisk a distribuci tohoto časopisu finančně podpořil


Kraj Vysocina

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: AEH, junulara, fervojista)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Vladimír Dvořák, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 999 091, vladimir.dvorak@esperanto.cz, (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidentino: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, libuse.dvorakova@esperanto.cz (Muzeo de Svitavy, rilatoj al urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

Kasisto: Vratislav Hirsch, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membrodatumado, kontakto)

Komitatanino: Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavla.dvorakova@esperanto.cz (membroj, kluboj, sekcioj, konferencoj, informado, retaj projektoj, ekspozicioj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. UPC 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Komitatano: Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, tel. 608 224 993, miroslav.hruska@esperanto.cz (junularo, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio kaj UK-peranto: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

Revizia komisiono de ĈEA:

Prezidanto: Jan Řepa (Fidel), Na Valše 250, 38411 Netolice, fidel@razdva.cz

Věra Gavandová, Komenského 657, 789 61 Bludov, vgavandova@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 09 Pardubice, ludmila.srbova@seznam.cz

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorferdomo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz, www.muzeum.esperanto.cz

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Polnický

101-a UK en Nitro

23 – 30 julio 2016

La slovaka urbo Nitro, historia centro de iama Grandmoravia regno, gastigis 1252 kongresanojn el 60 landoj. La reklamo en la urbo estis grandioza, verdaj flagoj flirtis sur ĉiuj stratoj, okazis pluraj koncertoj sur la ĉefa placo, kiujn povis partopreni ankaŭ Nitranoj, granda procesia marŝo kun brua muziko k.s.

Kiel kongresejo servis la agrikultura universitato kun kvar studenthejmoj malantaŭe, do nur kelkajn paŝojn al la tranoktejo. Sole la solenaj malfermo kaj fermo okazis en la sporta halo, al kiu la kongresanojn transportis specialaj busoj. Ankaŭ la konferenco pri eŭropa komunikado estis aranĝita en alia urboparto, en la universitato de Konstanteno Filozofo. Sed la kongresaj ŝildetoj portataj sur la kolo servis ankaŭ kiel senpaga veturbileto por lokaj busoj.

Pri la okazaĵoj raportis kongresa kuro Pribina (nomata laŭ la unua historie konata slovaka mezepoka princo), trovebla en la reto.

Nova estraro de UEA

Jam sabate, kiam la kongresanoj estis alveturantaj, la unua sesio de komitatkunveno reelektis kiel prezidanton de UEA d-ron **Mark Fettes**, restis ankoraŭ **Lee Kung-Kee**, **Stefan MacGill** kaj **Martin Schäffer**. Novaj estraranoj estas **Emilio Cid** kaj **Maria Rosaria Spanò**.

Inaŭguro de ekspozicioj

En la antaŭa tago, vendrede, en la urba sinagogo de Nitro estis inaŭguritaj ekspozicioj *Vivo de Zamenhof* kaj *Historio de Esperanto en Nitra*.

Solena malfermo

La dimanĉan antaŭtagmezan inaŭguron en la urba sporta halo partoprenis krom la kongresanoj ankaŭ ambasadoroj de Japanio, Kenjo, Ukrainio, vicambasadoro de Korea Respubliko kaj ataŝeo de Ruslanda ambasadejo. La kongreson salutis la urbestro Jozef Dvonč, Ján Figel kiel oficiala reprezentanto de EU kaj Štefan Rozkopál, estro de la kanceliero de la Slovaka prezidento. Ili legis siajn salutojn esperantlingve.



Post festaj paroladoj estis anoncigitaj tri novaj honoraj membroj de UEA (Vilmos Benczik, Petr Chrdle kaj So Gilsu) kaj la programon fermis 49 salutoj de landaj asocioj.

En la nomo de ĈEA parolis Miroslav Malovec, kiu diris: *Mi salutas la kongreson en la nomo de Esperanto-Muzeo en Svitavy, sidejo de ĉeĥaj esperantistoj, kiuj ĝuste antaŭ dudek jaroj ankaŭ gastigis universalan kongreson kaj postlasis Pragan manifeston. Ni atendas de ĉi tiu kongreso similan impulson.*

Post kantado de la himno **La Espero** estis la kongreso malfermita.

Festparolado de prezidanto de UEA Mark Fettes en la solena inaŭguro



Estimataj honoraj gastoj, karaj kongresanoj,

El la mond' eterne militanta, jen alvenis ni denove, pacaj batalantoj. Ne mankis pruvoj en la lasta jaro, ke nia strebado estas ankoraŭ aktuala. Multegaj homoj tra la mondo suferas pro militoj, pro persekutoj, pro manko de bazaj vivrimedoj.

Eĉ pli vastaj aroj suferas pro socia ekskludo, maltoleremo, maljusteco. Ni en ĉi tiu salono estas bonŝancaj – mirinde bonŝancaj. Kaj – se mi rajtas iom adapti frazon el la mondo de bildstriaĵaj herooj – kun granda bonŝanco venas granda respondeco.

Niaj kongresoj pruvas, ke homoj povas renkontiĝi kun homoj, sen rigardo al ties etna deveno, denaska lingvo, socia klaso aŭ aliaj diferencoj. Niaj kongresoj pruvas la potencon de lingvo neŭtrale homa por transponti la barojn, kiuj dividas nin. Jes, ĉion ĉi ni spertas ĉiupaŝe kaj ĉiuminute dum la kongresa semajno. Sed Esperanto ne estis elpensita nur por doni ĝojon kaj ĝuon al tiuj kelkaj parolantoj, kiuj sukcesas trovi monon kaj tempon por vojaĝi al la kongreso.

Ĝi estas rimedo por ŝanĝi la mondon.

Mi volas do iom paroli al vi pri tiu mondo kaj pri nia kontribuo al ĝi. Kaj kie pli bone komenci, ol ĉi tie en Nitro, la ĉarma kaj alloga urbo, kiu ĉijare gastigas nin? Antikva lulilo de la kristanismo, sidejo de potencaj reĝoj, longtempa centro de agrikulturo, pli laste nukleo de kreskanta elektronika kaj aŭtoindustrio, urbo kulture riĉa kaj turisme inspira – Nitro bone montras, kiel moderna urbo povas establiĝi sur la fundamento de kompleksa pasinteco.

Ĉar vi verŝajne jam rimarkis: el kiu ajn direkto vi venis al Nitro – ĉu de nordo aŭ sudo, de oriento aŭ okcidento – vi transiris landlimojn, kulturajn limojn, lingvolimojn. Tiu ĉi bela kaj fekunda ebenaĵo, ĉe la piedo de la Okcidentaj Karpatoj, estas ankaŭ historia vojkruciĝo de civilizacioj kaj popoloj. Iam en ĉi tiu regiono la romia mondo konfrontis la ĝermanajn tribojn; la alvenintaj slavoĵoj renkontis la frankojn de Karlo la Granda; la batal-emaj hungaroj gajnis, poste ili perdis reĝlandon; la islamaj otomanoj luktis kontraŭ la kristanaj princoj; protestantaj armeoj ondis tien, katolikaj reen; la habsburga imperio ŝvelis kaj disfalis; la unuan demokratian ŝtaton de ĉeĥoj kaj slovakoj forronĝis la faŝismo; kaj dum kvardeko da jaroj post la dua mondmilito, la Fera Kurteno dividis Orientan kaj Okcidentan Eŭropon.

Estas facile fokusiĝi al tiuj dividoj kaj konfliktoj. Ili estis realaj. Multe da sango fluis ĉi tie tra la jarcentoj. Sed la vera miraklo estas tio, ke ili ne daŭris eterne. Kiam ajn iu armita forto aŭ dogma kredo desegnis limon sur la tero, aliaj fortoj – la liberigaj fortoj de ideoj, de komerco, de amikeco kaj scivolo, de arto kaj spirito – sukcesis transiri ĝin, subfosi ĝin, transformi ĝin en ion alian.

Jen rakonto pri tio.

Antaŭ longe en ĉi tiu regiono ekestis la ŝtato Granda Moravio. Temas pri la unua slava reĝlando, pri kiu ni havas dokumentajn pruvojn. Ĝia unua reganto estis princo Mojmir la Unua; ĝia centro estis Nitro. Laŭ invito de la posteulo de Mojmir, Rastislav, en la jaro 863 venis ĉi tien la grekaj misiitoj Kirilo kaj Metodio, portante ne nur la kristanan kredon, sed ankaŭ skribsistemon, kiun ili ellaboris por la slavaj lingvoj. Pro sia konvinko, ke religiaj valoroj estu komunikataj en la lingvo de la popolo, la du fratoj devis batali kontraŭ pastroj, reĝoj, episkopoj kaj papoj. Oni povus verki epopeon pri ilia lingvopolitika odiseado, kiu daŭris ĝis la fino de iliaj vivoj.

Laŭ la kutimaj mezuroj, Kirilo kaj Metodo fine malvenkis. Iliaj disĉiploj estis forpelitaj el Moravio, rifuĝante suden al la teritorio de la bulgaroj; la romia eklezio restis ankoraŭ longtempe kroĉita al la klasikaj liturgiaj lingvoj, la hebrea, greka kaj latina. Sed tiu ŝajna malvenko tamen plantis semojn, kiuj poste kreskos en la vastan arbaron de la sud- kaj orientslavaj literaturoj, ankoraŭ hodiaŭ skribitaj en alfabetoj adaptitaj el tiu origina skribo de Kirilo kaj Metodio.

Kio laŭ mi estas rimarkinda en tiu rakonto, tio ne estas simple la disvastiĝa potenco de bone elpensita lingva inventaĵo. Malantaŭ ĝi troviĝas pli profunda ideo: ke la lingvo estas rimedo por kunigi kaj povigi ordinarajn homojn. Eĉ pli grave ol la kirila skribo mem, tiu ideo pluviados poste en la eŭropa civilizacio. Oni retrovos ĝin ĉe la luteranoj, kiuj insistos pri la rajto de individuoj mem legi la sanktajn librojn en sia propra lingvo; oni retrovos ĝin ĉe la naciliberigaj movadoj, kiuj insistos pri la

valoro de gazetoj, literaturo kaj historio verkitaj en la lingvo de la popolo; oni retrovos ĝin en la popolklerigaj movadoj de la 19a kaj 20a jarcentoj, kiuj rigardos vastan alfabetigon en la propra lingvo kiel bazon por demokratio. Efektive, ne eblas imagi modernan Eŭropon sen tiu ideo.



Jen, do, kion mi volas emfazi: ke en ĉi tiu sama regiono, kie okazis tra la jarcentoj batalo post sanga batalo pri la limoj de regpovo, kredo, nacieco, naskiĝis ankaŭ ideo kun potenca liberiga kaj unuiga forto. Oni ne devas akcepti la regantajn kutimojn pri lingvoj kaj komunikado; oni povas, per la homa genio, krei novajn rimedojn, novajn imagitajn komunumojn, novajn normojn de homa solidareco kaj homa libereco. Ĉar ni memoru, ke Kirilo kaj Metodio estis motivitaj de esence homfratiga ideo. Por ili, la kristanismo superis ĉiujn lokajn identecojn; sub ĝia tegmento ĉiuj homoj estus egalaj kaj egalvaloraj.

Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto, naskita nur okcenton da kilometroj norde de ĉi tie, heredis de sia kultura medio ne nur la kirilan skribon, sed ankaŭ tiun ĉi ideon. Ni vidas en lia verkaro kreskantan emfazon, ke la pli profunda celo de Esperanto konsistas en ĝia kapablo levi la homojn super la limigita vidkapablo de ilia etna kaj socia identeco.

Sed por li, vivanta mil jarojn post Kirilo kaj Metodjo, la homfratiga rolo de unuopaj religioj estis jam pruvita nesufiĉa, same kiel la homfratiga rolo de unuopaj lingvoj. En la Deklaracio pri Homaranismo, kiu aperis en 1913, li skribis:

Mi estas homo, kaj la tutan homaron mi rigardas kiel unu familion; la divditecon de la homaro en diversajn reciproke malamikajn gentojn kaj gentreligiajn komunumojn mi rigardas kiel unu el la plej grandaj malfeliĉoj, kiu pli aŭ malpli frue devas malaperi kaj kies malaperon mi devas akceladi laŭ mia povo.

Mi vidas en ĉiu homo nur homon, kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj. Ĉian ofendadon aŭ premadon de homo pro tio, ke li apartenas al alia gento, alia lingvo aŭ alia socia klaso ol mi, mi rigardas kiel barbarecon.

En la mondo de 1913, tiuj vortoj sonis radikale. Sed nun aŭskultu tiun ĉi alian tekston, aperintan 35 jarojn poste:

Pro tio, ke agnosko de la esenca digno kaj de la egalaj kaj nefordoneblaj rajtoj de ĉiuj membroj de la homara familio estas la fundamento de libero, justo kaj paco en la mondo,

Pro tio, ke malagnosko kaj malestimo de la homaj rajtoj rezultigis barbarajn agojn, kiuj forte ofendis la konsciencon de la homaro, kaj ke la efektiviĝo de tia mondo, en kiu la homoj ĝuos liberecon de parolo kaj de kredo kaj liberiĝon el timo kaj bezono, estas proklamita kiel la plej alta aspirado de ordinaraj homoj...

Ĉu tio ne sonas zamenhofe?

Pro tio, ke nepre necesas, se la homoj ne estu devigitaj, sen alia elektebla vojo, ribeli kontraŭ tiranismo kaj subpremo,

ke la homaj rajtoj estu protektataj de la leĝo,

Pro tio, ke nepre necesas evoluigi amikajn rilatojn inter la nacioj,

Pro tio, ke la popoloj de Unuiĝintaj Nacioj en la Ĉarto reasertis sian firman kredon je la fundamentaj homaj rajtoj, je la digno kaj valoro de la homa personeco kaj je la egalaj rajtoj de viroj kaj virinoj, kaj firme decidis antaŭenigi socian progreson kaj pli altnivelan vivon en pli granda libereco...

Per la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, la mondo ricevis novan formulon por esprimi la valoron de ĉiu unuopa homo. Tion tamen eblis atingi nur per la traŭro de tiu longa sanga vojo, kies spuroj troviĝas ankaŭ ĉi tie, en Nitro. Kaj la radikoj de la universalaj homaj rajtoj estas la radikoj ankaŭ de Esperanto – de tiu lingvo neŭtrale homa, kiu hodiaŭ kunigas nin.



Por nia kongresa temo ĉijare, ni elektis eksplicite kunligi du ideojn: socia justeco kaj lingva justeco. La unua estas vaste konata. Ni ĉiuj komprenas, ke diversaj homoj spertas marĝenigon kaj ekskludon en niaj nuntempaj socioj; ke fundamentaj necesajoj kiel loĝado, manĝaĵoj, vestoj, pura akvo, sanprizorgo kaj edukado estas malegale distribuitaj; kaj ke tiajn situaciojn oni ne ŝanĝas nur per leĝaj kaj parlamentaj decidoj, sed foje necesas

ŝanĝi la strukturojn de la socio mem. La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kaj aliaj parencaj deklaroj, kiel la Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj kaj la Internacia Pakto pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj – ambaŭ kvindekjaraj ĉidecembre – helpas konkretigi niajn ideojn pri tio, kiel aspektu socio vere justa. Eĉ se tia socio ne estas plene realigebla, la laboro por provi realigi ĝin estas en si mem valora kaj necesa. Tio estas kerna trajto de socia justeco.

Sed la dua parto de nia temo, lingva justeco – tio estas malpli ofta koncepto. Lingvo estas tiel fundamenta parto de la strukturo de socio, ke ĝi estas ofte nevidebla, kiel akvo por fiŝo. Ni ofte ne rimarkas, kiam aliaj homoj spertas marĝenigon aŭ ekskludon pro lingvo, same kiel ni ne perceptas, kiel lingvo estas parto de tiaj esencaj sociaj servoj kiel sanprizorgo aŭ edukado. Kaj tamen provu imagi, kiel vi sentus vin, se en kliniko aŭ hospitalo neniu komprenus la lingvon, kiun vi parolas, aŭ se en lernejo la instruisto alparolus vin per lingvo al vi nekonata. Lingvo estas profunda parto de nia homeco, kaj ni ne povas senti nin plene homaj, se nia lingvo ne renkontas rekonon, respekton kaj respondon.

Tiu konstato troviĝas ĉe la bazo de la Esperantomovado.

Ni laboras por konstrui mondan socion, en kiu ĉiu homo povas plene homi, ankaŭ lingve. Eĉ se tia monda socio ne estas plene realigebla, la laboro por *provi* realigi ĝin estas en si mem valora kaj necesa. Ni konvinkiĝis, ke lingvo neŭtrale homa alportas esencan kontribuon al tiu laboro. Tio ne signifas, ke ni havas respondojn al ĉiuj demandoj. Ni solaj ne povas diri, kiel plej bone

organizi niajn sociojn por realigi lingvan justecon en la sanprizorgo aŭ en lernejo, ekzemple.

Sed ni insistas starigi tiujn demandojn. Ni insistas, ke lingva maljusteco ne fariĝas pli justa, se oni ignoras ĝin aŭ deklaras ĝin neatingebla. Ni insistas, ke oni povas, per la homa genio, krei novajn rimedojn por la protekto kaj povigo de la homoj, kaj ke tiuj rimedoj povas esti ankaŭ lingvaj. Ni insistas, ke nia lingvo Esperanto estas tia rimedo.

Pri la potenco de tiu rimedo mi ne bezonas konvinki vin, karaj aŭskultantoj. Vi ja kunvenis ĉi tie por sperti la unikan etoson de mondkongreso, en kiu homo renkontiĝas kun homo. Ĝuu la semajnon! Sed mi instigas vin ankaŭ pensi pri la multegaj homoj, kiuj ĉiutage spertas la mankon de lingva justeco, kiuj ĉiutage spertas la mankon de socia justeco. Se tiuj pensoj tiros vin al unu el la kunsidoj pri la kongresa temo aŭ al aliaj sesioj pri parencaj temoj, des pli bone! Niaj kongresoj devus esti ne nur distraj sed ankaŭ klerigaj; ne nur amikaj, sed ankaŭ aktivigaj. Ni havas multon por fari. Mi esperas, ke la kongresa semajno donos al vi multajn ideojn, energion kaj inspiron por tiu granda laboro.



Fotoj Jozef Baláž
Vladimír Škuta
arkivo UK 2016

Novaj Honoraj membroj de UEA proklamitaj dum la solena inaŭguro Vilmos Benczik, Petr Chrdle, So Gilsu


Vilmos BENCZIK (Hungario)

naskiĝis en 1945. Profesie li estis profesoro en altlerneja fakultato de la universitato ELTE en Budapeŝto.

Li lernis E-on en 1959, aliĝis al UEA en 1966 kaj iĝis dumviva membro en 1977. Li estis komitatano de TEJO 1964–1968 kaj estrarano de Hungara E-Asocio 1965–1967 kaj 1978–1992.

Li redaktis la revuon *Hungara Vivo* 1977-1982 kaj de 1976 ĝis 1990 gvidis la eldonejon de HEA, ĉe kiu aperis 138 libroj en/pri E-o en la suma kvanto de 368 mil ekz.

Li estis LKK-ano de la 68a UK en Budapeŝto en 1983, komitatano de UEA 1980-1986 kaj prezidanto de la Belartaj Konkursoj de UEA 1986-2002.



Li verkis recenzojn por multaj revuoj, parte kolektitajn en *Studoj pri la Esperanta literaturo* (1980), kaj abunde artikolis kaj tradukis. Li redaktis i. a. *Libro de romanoj* (1979), *Ŝercoj, rakontoj* (1972, 2a eld. 1974), *25 jaroj: antologio de Belartaj Konkursoj* (kun W. Auld; 1977), *La kato en la sako* (legolibro; 1978), *Baza literatura krestomatia* (1979, 3a eld. 1986), *Hungara antologio*

(1983), *Mi vizitis mian farmon* (antologio de E-literaturo en la hungara kaj Eo; 1987) kaj *Lingva arto* (jubilea libro por W. Auld kaj M. Boulton; 1999). Ekde 2001 Benczik estas membro de la Akademio de E-o.

SO Gilsu (Korea Resp.)

naskiĝis en 1944. Li doktoriĝis en 1979 kaj ekde tiu jaro estis profesoro pri ekonomiko en la Universitato Sokyong en Seulo. Li estis ankaŭ direktoro de la Korea Asocio pri Ekonomia Historio kaj prezidanto de la Instituto pri la Historio de Kogurjo.

Li lernis E-on en 1966 kaj unue aktivis en la junulara movado, i.a. kiel prezidanto de Korea E-Junularo. Li estis sekciestro de ILEI en Koreio kaj vicprezidanto de Korea E-Asocio. En UEA li membriĝis en 1971 kaj estis komitatano kaj estrarano pri la azia agado kaj pri faka kaj scienca aplikado 1989-1995. Kiel estrarano li redaktis la bultenon *Esperanto en Azio* 1990-1993 kaj fondis la Komisionon pri Azia E-Movado en 1994. Li prelegis en la Internaciaj Kongresaj Universitatoj en Varno (1978), Braziljo (1981), Budapeŝto (1983), Varsovio (1987) kaj Seulo (1994). Krome, en la 97a UK en Seulo li estis rektoro de IKU.

So aŭtoris la lernolibrojn *Kursolibro de Esperanto* (7a eld. 1982) kaj *Praktiko de Esperanto* (1976, 2a eld. 1981). Li instruis E-on i.a. en pluraj koreaj universitatoj, en la Nord-Amerika Somera Kursaro en San Francisko kaj en Aŭstralio. En lia traduko aperis en 1983 la libroj *La sindonema arbo* kaj *Mi serĉas mian perditan...* de Shel Silverstein.

Komunikoj de UEA

Intervjuo kun Petro Chrdle

Petro Chrdle estis nomumita honora membro de UEA ene de la 101a UK en Nitra. Liaj aktivecoj estas al la legantoj de Starto sufiĉe konataj, krome ni raportis pri li en la pasinta numero lige al lia vivojubileo. Tial mi decidiĝis hodiaŭ nur starigi al li kelkajn demandojn. Jen ili kaj liaj respondoj:



*Nova honora membro aplaŭdata de la kongresanoj
foto Kasia Wróblewska, arkivo UK 2016*

Kiel vi fariĝis esperantisto?

Nu, ne eblas koncize priskribi mian vojon al esperantisteco, ĉar temis pri longa kaj interrompata vojo gvidita per hazardoj. Eble mi menciui, ke mi vidis iam en la 1960aj jaroj la unuan fojon la vorton Esperanto en la kunteksto „Ĉu vi deziras komuniki per Esperanto kun la tuta mondo? Venu al ...“ Mi supozis, ke temas pri iu nova inventaĵo; eble mi antaŭvidis interreton. Do mi venis – kaj fariĝis eterna komencanto. Pri la sekva ŝtupo, kiam Martin Stuppnig sukcesis paroligi min eĉ kontraŭ mia volo uzante trompon, ke li ne komprenas la germanan, mi skribis en Starto 2016/1. Kaj mi mem konsideras min esperantisto ekde la jaro 1982, kiam mi hazarde vizitis la konferencon Interkomputo 82, kiu faris

min admiranto de tiu mirakla komunikilo, pro kio mi rapidege ellernis ĝin sufiĉe profunde por povi ne nur pasive uzi ĝin, sed ankaŭ ekverki en ĝi fakajn artikolojn. Kiu interesiĝas pri mia zigzaga vojo al esperantisteco, plena de hazardoj, povas aŭskulti mian rakonton prian.¹

Kiel estiĝis KAVA-PECH?

Post la politika ŝanĝo en 1989 mi, esploristo en Fervoja esploringeniero, startigis promesplenan karieron: Ĉar tiutempe mankis fakuloj regantaj fremdajn lingvojn kaj nia instituto komencis intense kunlabori kun eksterlandaj institucioj, kaj ĉar validas la konata sentenco, ke inter blinduloj reĝas strabuloj, mi fariĝis estro de la sekcio de la internacia departemento kaj eĉ reprezentanto de la ĉefaj fervojoj ene de grava fervoja projekto de UNO, ĉar mi kapablis komuniki krom ruse ankaŭ angle kaj germane.

Tamen mi ĉiam revis pri tio, ne havi ĉefojn kaj povi fari, kion mi mem volas kaj ne kion mi devas. Tio ne eblis antaŭ la jaro 1989, sed ekeblis pli poste, kaj tio ege logis min. Do mi, malgraŭ bone ekstartinta kariero, jam en 1991 fondis propran agentejon KAVA-PECH. Prove mi ĝin ekfunkciigis paralele kun mia ĉefa okupo, sed baldaŭ mi vidis, ke tio ne eblas. Do jam aŭtune 1992 mi maldungiĝis de la esploringeniero, kaj ekde tiam mia ununura ĉefo estas mi mem.

Eble mi ankaŭ klarigu, kion signifas tiu enigma nomo de mia agentejo. Temas pri mallongigo de la kompleta ĉefa nomo, origine *Konzultační a vzdělávací agentura Petra Chrdleho*, kio montras, ke ĝia plej ĉefa intencita agado estis edukado kaj „disverŝo de mia saĝeco“.

¹ <http://www.ipernity.com/doc/181031/32946781>

Sed baldaŭ mi ekkomprenis, ke pri mia „saĝeco“ ne estas intereso kaj male mi organizis kelkajn surprize sukcesajn konferencojn, do mi ŝanĝis la nomon al *Kongresová a vzdělávací agentura Petra Chrdleho*, ke povu resti la mallongigo, kaj mi ĉesis oferti konsultadon en mia fako. Mi tute ne intencis eldonadi librojn, sed al tio devigis nin la situacio. „Nin“ signifas krom mi mem mian edzinon Stanjo². Ni ekkomprenis, ke multaj prelegkolektoj el de ni organizitaj konferencoj havas daŭran valoron kaj do ni volis, ke ili portu ISBN kaj estu devige registritaj en internacie alireblaj katalogoj kaj neforĵetinde metitaj en difinitaj bibliotekoj. Sed kiam ni alparolis eldonejojn, ili aŭ priridis nin, kiam ni volis eldonkvanton de ekzemple 100 ekzempleroj, aŭ donis al ni astronomian prezon, kiu tiom kostigus la konferencan kotizon, ke neniu aliĝus. Tiam Stanjo proponis, ke ni do registriĝu kiel eldonejo, ekhavu propran ISBN kaj eldonadu la prelegkolektojn mem.



Petro kun Stanjo

Necesas mencii, ke tiam ne ekzistis la cifereca presteknologio. Do ni aĉetis kopimaŝinon, kaj Stanjo kopiis la manuskriptojn kaj dismetadis la foliojn al

² Stanislava Chrdlová (1954-2000)

librostokoj, kaj mi veturigis ilin al bind-ejo, kiu gluis de ili librojn. Iujn maldikajn ni eĉ mem pinglis per hoketoj kaj aĉetis grandan librotranĉilon por povi havi belajn randojn.

La libroeldonado fariĝis nia hobbio, do ni komencis eldonadi plurajn librojn, ne nur fakajn, kaj kiam ni sentis nin ekonomie sufiĉe fortaj, ni kunigis nian profesion agadon kun nia komuna hobbio – Esperanto – kaj komencis organizi aranĝojn ankaŭ por esperantistoj kaj eldonadi ankaŭ la Esperanto-librojn. La spertojn el nia profesia agado por esperantistoj kaj pere de Esperanto mi enmetis en mian verkon *Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj*³.

Kiajn planojn vi havas por la futuro?

Al junuloj certe ŝajnos la demando malkonvena, eĉ ironia rilate al pli ol sepdekjarulo, tamen mi jes ankoraŭ havas relative multajn planojn, ne nur kion eldoni, sed mi ankaŭ volus ion mem verki kaj traduki. Sed mi menciu nur tion, kies stato de prilaboro permesas antaŭvidi la realigon en videbla tempa perspektivo, mi diru ene de 12 monatoj. Sendube mi volas ankoraŭ eldoni vian grandan vortaron Esperanto-ĉeĥan⁴, sed antaŭ tio estas vicigita *Spirita revolucio en la koro de Eŭropo* kun la subtitolo *Rigardo en la historion de la ĉeĥa nacio* fare de Přemysl Pitter, en la traduko de Margit Turková.

El la ĉeĥaj verkoj rilatantaj al Esperanto mi nomu almenaŭ *František Vladimír Lorenc* de Vlastimil Novobilský, kun subtitolo *Svědectví o životě a díle neobyčejného člověka*. Kvankam la verko

³ La tria eldono aperis en 2014 en mia eldonejo KAVA-PECH: <http://kava-pech.cz/book-profuzo-czech.html>

⁴ Malovec, Miroslav: Velký esperantsko-český slovník, KAVA-PECH, verŝajne 2017

estas redakte preta, ĝi ankoraŭ ne aperis, ĉar ankoraŭ ni esperas pri malkovro de pli teknike kvalitaj ilustraĵoj, ol ni havas je dispono.

Se temas pri miaj propraj verkoj, al mi restas ankoraŭ sufiĉe da laboro por bone elprovadi kaj kompletigi la multmedian aldonajon al la lernolibro *Esperanto od A do Z* kaj momente mi tradukas el Esperanto-originaloj du koncizajn aŭtobiografiaĵojn de Koffi Gbeglo (*De vilaĝo al ĉefurbo* kaj *Mia kredado*), kiujn mi planas eldoni en la ĉeĥa en unu volumo kune kun tria parto: reta intervjuo kun la aŭtoro, pri kiel evoluis lia nefacila sed interese viva kaj precipe pri liaj pensmaniero kaj filozofia vidpunkto post la vivoperiodo priskribita en la antaŭaj du partoj.

Memkompreneble, mi havas pli da planoj, sed ilin mi ne volas malkaŝi, ja mi ne scias, kiom longe ankoraŭ mi havos bonŝancon povi ĝui la laboron.

Dankon por viaj respondoj.



KAEST-oj estas grava aktivaĵo de Petro

Fine mi deziras al vi firman sanon por longa tempo, por ke vi povu plenumi ne nur la menciitajn planojn, sed ankaŭ tiujn, kiujn vi momente lasas kaŝitaj nur por vi mem.

Intervjuis: Miroslav Malovec

5 www.kava-pech.cz/procvicujesesperanto - volontuloj pretaj helpi la testadon bonvenaj

PREMIOJ DE FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI

La Fondaĵo Antoni Grabowski (FAG) estis kreita en la jaro 1988 sur la bazo de grandanima donaco de Adam Goralski (1912–2005). Ĝia celo estas subteni la Esperantan kulturon per premioj kaj subvencioj. La ĵurio de FAG, kiu aljuĝas premiojn meze ĉiun duan aŭ trian jaron, konsistas el Ulrich Lins, Shi Chengtai kaj István Ertl. La administradon de la Fondaĵo prizorgas la Centra Oficejo de UEA.

En la Nitra UK estis anoncitaj la ĉi-jaraj premioj.

La unua premio (700 us. dolaroj) iras al Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer. Ili ricevas ĝin pro sia komuna verko *Historio de la esperanta literaturo*. Tiun verkon, kiun Tazio Carlevaro en Heroldo nomis enciklopedio de la Esperanta kulturo, la ĵurio de FAG opinias impona, ne baldaŭ superota prezento de la originala beletro en Esperanto.

La duan premion (300 us. dolaroj) ricevas Hispana Esperanto-Federacio pro "Bitoteko", elektronika biblioteko, per kiu ekde 2013 elstaraj verkoj estas facile kaj senkoste alirebligataj al la publiko; laste, okaze de la 400-a datreveno de la morto de Miguel Cervantes, Donkiĥoto en la traduko de Fernando de Diego.

Premio de 150 us. dolaroj estis donita al Jean Codjo, beninano vivanta en Kanado. Li kontribuis al la Esperanta literaturo per rakontoj, kiuj atentinde riĉigas la interkulturan dialogon. La ĵurio per sia decido ankaŭ volas kuraĝigi lin, ke li plue levu sian voĉon inter la esprimantoj de nia originala beletro.

Gazetaraj komunikoj de UEA

REZULTOJ DE LA BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2016

BRANĈO POEZIO

Unua premio al Antonio Valén, Hispanio pro "Paralele"

Dua premio al Benoît Philippe, Germanio pro "Mathias"

Tria premio al Aleksandro Mitin, Rusio pro "Agemaj homoj kuras al sukceso"

Honora mencio al Valentin Melnikov, Rusio pro "Ironiaj hajkoj"

Juĝkomisio: Anja Karkiainen, Gerrit Berveling, Giulio Cappa

Partoprenis 39 verkoj de 18 aŭtoroj el 15 landoj

BRANĈO PROZO

Unua premio al Jesper Lykke Jacobsen, Francio pro "La paradiza turo"

Dua premio al Lenke Szász-Praid, Rumanio pro "La heliko kaj la lacerto"

Tria premio al Ewa Grochowska, Francio pro "Malbenitaj skaraboj"

Tria premio al Amir Naor, Israelo pro "Anĝela"

Honora mencio al Steven D. Brewer, Usono pro "Krepusko sub fago"

Juĝkomisio: Ĵak Le Puil, Eliza Kehlet, Tim Westover

Partoprenis 25 verkoj de 18 aŭtoroj el 12 landoj

BRANĈO TEATRAĴO

Unua premio ne aljuĝita

Dua premio al Amir Naor, Israelo, pro "La situacio"

Tria premio ne aljuĝita

Honora mencio al Raffaele del Re, Italio pro "Teleskopoj ne funkcias"

Juĝkomisio: Wera Blanke, Paul Gubbins, Giuliano Turone

Partoprenis 3 verkoj de 3 aŭtoroj el 3 landoj

BRANĈO ESEO

Unua premio – premio Luigi Minnaja - al Rafael Henrique Zerbetto, Brazilo pro "La influo de Esperanto en la verkaro de Joao Guimaraes Rosa"

Dua premio al Jorge Camacho Cordón, Hispanio pro "La vartisto de vortoj"

Tria premio al Jesus Moinhos Pardavila,

Galegio pro "La arkitekturo de deziro en la verkoj de Tarkony"

Honora mencio al Jesus Moinhos Pardavila, Galegio pro "Poŝtkarto el la genra tranĉeo: kio okazis al niaj verkistinoj?"

Juĝkomisio: Detlev Blanke, Gotoo Hitoshi, Giridhar Rao

Partoprenis 7 verkoj de 6 aŭtoroj el 5 landoj

INFANLIBRO DE LA JARO

Eldonejo Bjelovara E-Societo pro "La trajno en la neĝo"

Juĝkomisio: Edmund Grimley Evans, Kitagawa Hisasi, James Rezende Piton

Partoprenis 4 verkoj de 4 eldonejoj el 4 landoj

UEA DIPLOMIS 14 AGANTOJN

En la Solena Fermo de UK en Nitro oni anoncis la nomojn de 14 esperantistoj, kiujn la Estraro de UEA honorigis per Diplomo pri Elstara Agado aŭ per Diplomo pri Elstara Arta Agado: **Ĵomart Amzejev kaj Natalja (Nataŝa) Gerlach** (Svedio) pro longtempa kontribuado al la Esperanto-muziko;

Jean Codjo kaj Adjévi Adjé (Kanado, Togolando) pro longdaŭra agado por Afrika Esperanto-Movado;

Ilia Sumilfia Dewi (Indonezio) pro kontribuoj al la movado en Sudorienta Azio;

Ruth Keves-Cohen (Usono) pro granda kontribuo al la kreo kaj subtenado de la E-kurso ĉe Duolingo;

Tatjana Loskutova (Rusio) pro instruado de Esperanto en aziaj landoj;

Márkus Gábor (Hungario) pro kontribuoj al la Esperanto-literaturo kaj al la disvastigo de Esperanto en Azio;

Judith Meyer (Germanio) pro kontribuoj al la diskonigo de Esperanto en interreto;

Jorge Montanari (Argentino) pro la iniciato kaj gvidado de la futbalteamo Esperanto;

Wladimir Opoka (Pollando) pro multjara kontribuado al la medicina agado kadre de UMEA;

Leopold Patek (Aŭstrio) pro longtempa gvida rolo en la aŭstria movado kaj 25-jara ĉefdelegiteco de UEA;

Syôzi Keiko (Japanio) pro longtempa gvida rolo en la japana Esperanto-Movado;

Ján Vajs (Slovakio) pro fakaj kaj primovadaj verkoj.

RESPONDECOJ DE LA UEA-ESTRARANOJ

La Estraro de UEA decidis pri la labor-
kampoj de siaj membroj:



Mark Fettes
Prezidanto

Mark Fettes (Prezidanto):
Strategio, Kunordigo, Statu-
ta Reformo, Esploro kaj Do-
kumentado, Faka kaj Scien-
ca Agado;



Stefan MacGill

Stefan MacGill (Vicpre-
zidanto): Instruado, Jaro de
la Lernanto, Meza Oriento
kaj Norda Afriko, Rilatoj
kun Membro-Organizoj kaj
Ĝemelaj Urboj;



Martin Schäffer

Martin Schäffer (Ĝenerala
Sekretario): Financoj, Ad-
ministrado, Retejoj kaj
Retlistoj, Ameriko;



Emilio Cid

Emilio Cid: Informado,
Amikoj de Esperanto kaj
Zamenhof-Jaro;



Lee Jung-kee

Lee Jung-kee: Azio, Afriko
kaj Esperanto-Centroj;



Maria Rosaria Spanò

Sara Spanò: Eksteraj Ri-
latoj, Aktivula Maturigo,
Eŭropo, Terminologio, Kul-
turo kaj Kongresoj.

*Gazetaraj Komunikoj de UEA
fotoj: kongresa kuriero*

Scienca programo en UK

Enkadre de la kongreso estis aŭskulteblaj
prelegoj de la 69a sesio de **Internacia
Kongresa Universitato** sub rektoreco de
d-ino Eva Poláková: *Lingva justeco:
Optimumaj minoritataj rajtoj kaj ilia
realigo* (Bengt-Arne Wickström),
*Astrobiologio kaj vivo en nia kaj aliaj
sunsistemoj* (Amri Wandel), *Lingva
justeco en la fakliteraturo* (Javier
Alcalde), *Socia justeco kaj publika sano
kiel principoj fronte al la neatendita
kontraŭstara sinteno al vakcinoj* (José
Antonio Vergara), *La Diabloj en la Silka
Vojo - ĉu rabistoj aŭ savintoj* (So Gilsu),
*Novaj teknikaj evoluoj por bildigi pro-
cezojn je atoma kaj subatoma niveloj*
(Orlando E. Raola), *Edukado al repac-
iĝo: Kanadaj lernejoj alfronte al la indi-
ĝena realo* (Mark Fettes), *Ĉu Zamenhof
kaj Esperanto povas endanĝerigi nian
Teron? La rilato de asteroidoj en nia
sunsistemo al nia planedo* (Michael
Maitzen), *Samaj motivoj en popolaj fa-
beloj de diversaj landoj* (Anna Stri-
ganova). La prelegaro aperis libroforme.

Aliaj interesaj prelegoj: *Ĉu Cirilo kaj
Metodio kreis novan lingvon?* (Jouko
Lindstedt), *Pravigo de la slava
interlingvistiko: slava reciprokeco kaj
tutslava lingvo en la historio de slavoj*
(Aleksandr Dimitrevič Duliĉenko kaj
Věra Barandovská-Frank), *Slava lingvo-
konstruado en la 21-a jarcento* (Jan van
Steenberger), *La mondoj de la fratoj
Strugackij* (Mikaelo Bronŝtejn), *Kiel 400
000 homoj eklernis Esperanton per
Duolingo?* (Chuck Smith), *La katalogo
Trovanto: serĉostrategio kaj utiligo de
ciferecigitaj dokumentoj* (Bernard Tui-
der) kaj pluraj aliaj.

Perspektivoj de lingva komunikado en Eŭropa Unio

estis nomo de internacia konferenco, kiu okazis ĵaŭde kaj vendrede en Universitato de Konstanteno Filozofa kun laborlingvoj slovaka, angla kaj Esperanto, ĉar ĝin partoprenis ankaŭ neesperantistoj. La aŭskultantoj ricevis aŭskultilojn kaj povis elekti interpretadon. Estis traktataj du temoj:

■ *Lingvaj problemoj de civitana partopreno kaj lingvaj problemoj ĉe ekonomia integriĝo*

■ *Stato kaj perspektivoj de lernado de fremdaj lingvoj en EU.*



Fakuloj el diversaj universitatoj prezentis siajn vidpunktojn rilate al la fakto, ke la angla ne sufiĉas, sed ne ĉiuj konsentis, ke Esperanto estus solvo.

Dominado de la angla havas pozitivajn trajtojn, tamen ankaŭ negativajn.

Ekzemple la Eŭropa Patenta Oficejo agnoskas sole la anglan, francan kaj germanan, aliaj landoj devas investi multe da mono por tradukado. Tial polaj kaj portugalaj kompanioj pagas pli multe ol usonaj kaj aŭstraliaj, kvankam temas pri protektado de rajtoj en Eŭropo.

La Barcelona Eŭropa Konsilio 2002 rekomendis, ke ĉiuj EU-civitanoj studu almenaŭ tri lingvojn, la gepatran plus du fremdajn. Plejparto de civitanoj kiel la

unuan fremdan lingvon elektas la anglan. Se ili lernas sukcese, alian lingvon ili konsideras senbezona, se ili ne sukcesas, la malsukceso senkuraĝigas ilin lerni alian fremdan lingvon.

Estus necese elvoki ĝeneralan publikan diskuton pri la lingva problemo kaj pri graveco de lingvopolitiko.

La konferencon solene malfermis prof. d-ino Gabriela Mišíková, vicrektoro por internaciaj rilatoj de la Universitato de Konstanteno la Filozofa. Parolis ankaŭ d-ro Vytenis Povilas Andriukaitis, Eŭropa Komisionano por sano kaj manĝaĵ-sekureco.



Proksimume 40 prelegantoj prezentis siajn opiniojn pri la lingvaj problemoj kaj pri ilia solvado.

El ĈEA partoprenis inĝ. Viktor Dvořák kaj Miroslav Malovec, kiuj informis pri traktado kun ĉeĥa ministerio pri edukado, ĉu Esperanto povus esti instruata kiel dua fremda lingvo en la elementaj lernejoj. La ministerio disponigis al ni normojn por instruado de dua fremda lingvo, kiujn ni adaptis por Esperanto kaj ellaboris instruplanon. Tamen oni diris al ni, ke Esperanto povas esti instruata nur, se konsentos la gepatroj kaj se la lernejo disponas pri universitate klera fremdlingva instruisto kun specialiĝo pri Esperanto. Malgraŭ tio estas grave scii, ke Esperanto apartenas al la grupo "Dua lingvo".

fotoj P. Baláž

KULTURO en UK

En la kongreso okazis pluraj kulturaj aranĝoj, ekz. **Lúčnica**, la plej bona slovaka folkloro ensemblo, sin prezentis dimanĉe sur la centra placo de Svätopluk por la tuta urbo.

Realigis pluraj koncertoj, inter ili de ĉeĥa grupo **NOPROBLEM**, kies tekstojn esperantigis ĉeĥaj esperantistoj. Prezentigis pluraj filmoj kun esperantlingvaj subtekstoj (ekz. nia **Konkero de Norda Poluso**).

En la urba sinagogo pola bardo Georgo Handzlik prezentis la vivon de Zamenhof kaj en la urba Teatro Andrej Bagár okazis du spektakloj kun ankaŭ ĉeĥaj rolantoj.

En la ĉefa scenejo la studenta ensemblo DOMA el Svitavy prezentis fragmentojn el dramo de fratoj Čapek **El la vivo de insektoj** (tr. M. Malovec inspirate de la kompleta traduko de J. Vondroušek) sub reĝisoro gvido de R. Oblouková.



Foto Jozef Baláž

Apude en la malgranda scenejo oni povis aŭskulti versojn **Tuŝoj je animo** de Jozef Leikert, kiujn prezentis slovake profesia aktoro Jozef Šimonovič kaj esperantlingve Marek Blahuš kun la tradukintino Anna Iváková. La versojn akompanis muziko de ĉeĥa zimbalonistino kaj kantistino Zuzana Lapčíková kun ŝia trimembra orkestro, dancis solistoj el Nacia Teatro Brno Markéta Habalová kaj Michal Pimek, ĥoreo-

grafion de la spektaklo kunkreis Hana Litterová.



De maldekstre: Jozef Šimonovič, Jozef Leikert, Anna Iváková, Marek Blahuš, Michal Pimek, Markéta Habalová, Zuzana Lapčíková, ŝiaj akompanantoj. *Foton liveris A. Iváková*

La spektakloj ripetiĝis dufoje, do ĉiuj interesiĝantoj povis vidi ambaŭ.

Jam tradicie dum la kongreso ekzercis kelkaj kantemaj esperantistoj, kiuj konsistigis kongresan koruson kaj dum la solena fermo de la kongreso faris etan koncerton.



Foto Jozef Baláž

Grandan intereson vekis **futbala matĉo inter** esperantistoj kaj nitranoj.



Foto Jozef Baláž

Libroservo de UEA

Dum UK funkciis libroservo, kiu alportis ankaŭ plurajn novaĵojn.




foto Jozef Baláž

Inter novaj libroj estis ekzemple **La Pupo** de Bolesław Prus en traduko de Tomasz Chmielik, **Josef Ŝemer** de Amri Wandel pri lia karmemora kolego, **Historio de la Esperanta literaturo** de Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer, **Dudek kvar horoj el la vivo de virino** de Stefan Zweig, **Homoj de Putin** de Kalle Kniivilä kaj cent aliaj, ĉefe poeziaj aŭ lingvistikaj.

Estis tie ankaŭ novaĵoj ĉeĥaj, pri kiuj ni jam informis en Starto, nome **Kun fotilo inter libeloj** de Oldřich Arnošt Fischer, **Home en senhomeco** de Martin Stupnig, **Esperanto od A de Z** de Petro kaj Stanjo Chrdle, **Robinsoni na Sibiri** de Tivadar Soros enĉeĥigita de J. Drahotová kaj kompilita **Legolibreto XII**.

Aperis tie ankaŭ du novaĵoj de Jan Werner, nome **Konstrufaka kolekto** kaj **Terminaro de betono kaj de betonistaj laboroj**. Tiuj libroj estas mendebraj rekte ĉe la aŭtoro (Dřínová 18, 612 00 Brno, wernerjan@seznam.cz).



Por la kongreso mem aperis broŝuro de Jaroslav Karhan **La vojo al harmonio – Komenio-Zamenhof**, kiu aperadis en Starto (2012-2015) kaj kiun ĉiu kongresano trovis en siaj materialoj.

Ankaŭ klasikaĵo **Proglas**, supozata versa antaŭparolo de Konstanteno la Filozofo por lia traduko de Biblio en la slavan lingvon, aperis por Nitra, al kiu ĝi havas historian rilaton.



Peter Baláž prezentas la libron Proglas

foto Jozef Baláž

Por infanoj estis eldonitaj du libroj pri Heidi, knabineto el montaro de Johanna Spyri, nome **Migro- kaj lernoĵaroj de Heidi** kaj **Heidi povas apliki, kion ŝi lernis**.



foto A. Sochacki el arkivo de UK

En 2015 aperis 160 esperantlingvaj libroj sume kun 27 000 paĝoj kaj suma prezo de 2 160 eŭroj (60 000 kronoj).

"Mi sentas min kvazaŭ en paradizo", deklaris Enivaldo Alves Silva el Brazilo, unu el partoprenantoj de la

OFICIALA ANTAŬKONGRESA EKSKURSO

(antaŭ la 101a UKo)
okazinta inter la 19-a kaj la 23-a
de julio 2016 en Svitavy

La aranĝon ĉeforganizis ĈEA (surloke estraranoj Vladimír, Pavla kaj Libuše Dvořák kaj distance kasisto Vratislav Hirš) kunlabore kun UEA kaj Klubo de amikoj de Esperanto Svitavy. Partoprenis ĝin dudeko da kongresanoj el (laŭalfabete) **Aŭstralio, Brazilo, Ĉeĥio, Francio, Germanio, Hispanio, Japanio, Suda Koreio kaj Usono**, do laŭvorte vere el la tuta mondo.



Merkrede estis la partoprenantoj solene akceptitaj en la urbodomo far la vicurbestro Pavel Čížek kaj sekve ili promene konatiĝis kun memorindaĵoj de la urbocentro.

Sekvis projekciado, prezento kaj trarigardo de la Esperanto-Muzeo kaj eta refreŝiĝo kaj vizito de la apuda Urba Muzeo kaj Galerio, ĉiĉeronata de ĝia direktorino Blanka Čuhelová.



maldekstre nia plej fora gasto Heather Heldzingen el Aŭstralio

Vesperan kantprogramon en la Otten-dorfer-salono, dediĉitan al ĉeĥa voĉmuziko, prezentis tri ĉarmaj knabinoj el la loka kamerenseblo TRIO kune kun sia instruistino kaj muzikakompanantoj. Ne mankis ankaŭ tri kantoj tradukitaj al Esperanto, du el kiuj estis eĉ instruataj kaj sekve kantataj kune kun la publiko.

La ĵaŭdo apartenis al la tuttaga ekskurso al la urbo Olomouc, kie sub gvido de la prezidanto de la loka klubo Jiří Machačík kaj akompanate de pluaj klubanoj, oni povis viziti ĉefajn vidindaĵojn de la urbo. Ripozon ebligis restado en unika Ĝardeno de sensoj, realigita en 2011 por nevidantoj kaj malfortvidantoj.



Vespere oni vizitis la teatron Trám en Svitavy, kie membrinoj de lokaj amatoraj dancensembloj Sefa kaj Srdíčko (kaj membrinoj de la Asocio de handi-

kapuloj pro civilizaj malsanoj) pretigis ĉarman programon "*Dancoj el la tuta mondo*". Eblis vidi tradiciajn kaj modernajn kantri-dancojn, tangon, hispanan, ciganan kaj ekzotikajn orientajn dancojn.

Vendreda ekskurso direktiĝis al Lito-myšl. Antaŭtagmeze oni havis unikan ŝancon fari fakekskurson al la entrepreno Adfors okupiĝanta pri produktado de vitrofibroj. Sekve oni vizitis la ĉefplacon kaj la kastelon. Por la partoprenantoj estis preparita speciala duonhora koncerto en preĝejo, kiun prezentis 20 membroj de la miksitaj loka koruso Vlastimil. Danke al tio, ke unu membro estis esperantisto, oni ellernis kaj prezentis ankaŭ himnon en Esperanto.

La lasta vespero estis dediĉita al vizito de privata bierejo Na kopečku, kie oni povis konatiĝi kun produktado de biero, gustumi lokajn bierojn kaj tipan ĉeĥan manĝon. Ĉiuj kune amuziĝis per komuna kantado kun gitaro.

Sabate post matenmanĝo ĉiuj partoprenantoj (krom unu peraŭtulo) pludaŭrigis sian vojaĝon per aŭtobuso (kun paŭzo en Brno) al la UKo en Nitra.

La ĈEA-estraro volus elkore danki ĉiujn partoprenantojn kaj kunlaborantojn, kiuj meritis pri realigo de la sukcesa kaj bonetosa aranĝo.

Fotoj el la aranĝo kaj videoj el la kulturaj programoj disponeblas en la Muzea paĝo ĉe Ipernity.

<http://www.ipernity.com/doc/181031/album/909526>



Pavla Dvořáková

ĈINA DELEGACIO EN SVITAVY

La unuan tagon de la Antaŭkongreso partoprenis koincide ankaŭ 16-membra delegacio el Ĉinio, ĉiĉeronata de la redaktoro de Verda Stacio Pavol Kaščák. Estrino de la grupo estis profesorino Wang Xufeng, en Ĉinio konata novelistino kaj teo-eksperto. Rolon de interpretistino plenumis Zhang Ping (Ĝoja), redaktoro de la eksterlanda elsendo de Ĉina Radio, kiu jam dufoje vizitis nian landon.

En la grupo ĉeestis kaj reprezentantoj de la ĉina Esperanto-movado (kun kiuj traktis en nia muzeo ĈEA-prezidanto Vladimír Dvořák), sed ankaŭ junaj teokultivist(in)oj kaj entreprenist(in)oj.

Vespere la grupo plu daŭrigis sian vojon al Nový Jičín, en kies muzeo la sekvan tagon okazis inaŭguro de la fotoekspozicio pri Ĉinio lige al la internacia filmfestivalo "*Teo kaj amo*". De tie la grupo plu vojaĝis al la UKo en Nitra.

Ankaŭ en la Esperanto-muzeo oni inaŭguris tiukaze samteman malgrandan ekspozicion el verkoj de Pavol Kaščák, kiu kiel unu el 10 gajnintoj de la konkurso lastjare vojaĝis al Ĉinio.



Pavol Kaščák interpretas dum intervjuo, kiun faris kun Zhang Ping redaktoro de la Radio Pardubice.

Abychom splnili zákonné povinnosti, zveřejňujeme pozvánku na členskou schůzi, která je nejvyšším orgánem naší organizace a proběhne v rámci 16. sjezdu ČES v Pelhřimově. Podrobnější programové a organizační informace ohledně celého sjezdu jsou postupně doplňovány do Kalendáře akcí na www.esperanto.cz a přihlášení je včas obdržít prostřednictvím e-mailu. Těšíme se na vaši účast!

P O Z V Á N K A

NA ČLENSKOU SCHŮZI ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU, z.s.
(ČES)

v aule gymnázia Pelhřimov, Jirsíkova 244

dne 15.10. 2016 od 9 hod.



Program:

1. Zahájení a přivítání hostů, prezentace, kontrola usnášeníschopnosti, volba orgánů členské schůze (3-5-členného předsednictva, zapisovatele a ověřovatelů zápisu, volební komise, ...)
2. Zpráva o činnosti a hospodaření ČES a diskuze k ní
3. Zpráva o činnosti složek ČES
4. Stručné zhodnocení 5 let pod vedením současného výboru a diskuze k hodnocení
5. Představení kandidátů na předsedu a jejich vize (složení výboru, priority činnosti)
6. Volby výboru
7. Usnesení
8. Závěr


V Písku dne 12.9.2016

Předseda ČES
Ing. Vladimír Dvořák

EK "La Ponto" invitas vin al

ANTAŬKRISTNASKA RENKONTIĜO (AnkRo)

sabate la 10-an de decembro 2016
en Písek



ekde 10:00 – Kultura matineo en la Urba Biblioteko

eta promeno tra la urbo, ev. vizito de aktualaj ekspozicioj en la muzeo

13:15-16:00 Posttagmeza frandado kaj programo dediĉita al la Zamenhof-Tago kaj al kristnaska temaro (en „ĉevalejo“ de la paroĥejo Písek)

Kotizo 100,- CZK inkluzivas programon /inkl. lupagon/, org. elspezojn kaj refreŝigon

Peraŭta veturigo el/al stacidomo post antaŭa interkonsento eblas.

2 pakitaj donacetoj por kristnaska tombo kaj frandaĵoj bonvenas!

KONTAKTO:

pisek@esperanto.cz
Pavla Dvořáková
774 942424

Kapacito de sidlokoj estas limigita.
Kaze de intereso pri partopreno
bv. nepre anonci vin ĝis 5.12.!

Sukcesa HELPU HELPI 2016

La 15-an de junio 2016 okazis jam la tria aranĝo "Helpu helpi", dum kiu esperantistoj de la klubo E-mental' (en kiu multaj membras ankaŭ en ĈEA) aĉetis simbolajn brikojn por karitata projekto Briko (vidu <http://www.akcecihla.cz/>). La enspezo helpas konstrui labor-trejnadcentron por handikapuloj, kiu kreskas rande de Prago. Dum la unua aranĝo estis kolektita mono por 21 brikoj, dum la dua por 33 kaj ĉi-jare eĉ por 42 (unu peco kontraŭ 150 kronoj)!



La aĉetitaj brikoj estis ornamitaj per Esperanto-tekstoj kaj enmetitaj en simolan muron, kiu staras meze de Prago, en la strato Na příkopě, kie ĉiutage trairas amasoj da turistoj, kiuj admiras la muron kaj fotas ĝin.



Kun la muro ili nun ankaŭ fotas Esperanto-brikojn, kaj do oni povos vidi Esperanton en diversaj mondopartoj.

fonto: www.e-mental.cz

MAGDA ŠATUROVÁ (1929-2016)



La meritplena slovaka esperantistino Magda Šaturová-Seppová forpasis la 10-an de septembro en Bratislavo. Ŝi naskiĝis la 4-an de julio 1929.

Studinte la anglan filologion kaj doktoriĝinte en 1953 ŝi laboris kiel eldonredaktoro, unue ĉe belliteratura eldonejo kaj poste ĉe Slovaka Pedagogia Eldonejo (1955-1987).

Ŝaturová estis grava aŭtoro de lernolibroj kaj vortaroj por slovakoj. De ŝi aperis la lernolibro *Rozprávate po esperantsky: Ĉu vi parolas Esperante?* (1965), la poŝlernilo *Esperanto do vrecka* (1970), *Esperanto-kurso por progresintoj* (kun Pavel Rosa kaj Ján Jánošov; 1972), la kurslibro "por ĉiuj" *Esperanto pre každého* (kun František Šatura; 2004) kaj *Slovaka-Esperanta-slovaka turisma vortaro* (1989; 2-a eld. 1991; ŝi redaktis ankaŭ anglan version). Ŝi ankaŭ esperantigis slovakajn literaturaĵojn, kontribuante interalie al *Slovaka antologio* (1977; 2-a eld. 1980).

Ŝi multe prelegis kaj artikolis pri leksikografiaj kaj didaktikaj problemoj, instruis, verkis poemojn, recenzis kaj gvidis kursojn ĉe la katedro de fremdaj lingvoj en la Universitato de Komenio en Bratislavo. Ŝi estis ankaŭ membro de AIS San Marino. Ekde 1990 ŝi estis landa reprezentanto de IKUE. En UEA ŝi membriĝis en 1947 kaj estis ĝia fakdelegito pri lingvistiko, literaturo kaj katolikismo ekde 1960 ĝis sia forpaso.

Slovakia Esperanto-Asocio distingis Magda Šaturová per arĝenta medalo en 1987. En la 89-a UK en Pekino en 2004

ŝi estis elektita kiel Honora Membro de UEA. Pro sia sanstato ŝi ne povis partopreni en la ĉi-jara UK en sia hejmlando, sed en sia varmkora salutmesaĝo al la kongresanoj ŝi skribis, ke ŝi anime estas kun ili.

Gazetara komuniko de UEA

Libor Křivánek (1926-1983)

La 27-an de aŭgusto ĝisvivus 90 jarojn s-ano Libor Křivánek. Li naskiĝis en Bělá pod Bezdězem, studis Komerčan akademion en Mladá Boleslav kaj ĵurnalismon en Prago.



Pli ol 20 jarojn li laboris en Muzeo de la regiono Prácheň en Písek. Li amis studi fremdajn lingvojn; Esperanton li lernis baldaŭ post la milito en kursoj de Václav Špŭr en Doksy. Edziĝinte al Písek, kun sia edzino Radka li refondis en 1952 en la urbo Esperanto-klubon (ĉe vestaĵfabriko Jitex), kiun li multajn jarojn gvidis.

Krom kursoj kaj kunvenoj li organizis ankaŭ tendarojn kaj busekskursojn eksterlanden. En la 1960-aj jaroj li fariĝis UEA-delegito por turismo, en 1966 li fondis Turisman Esperanto-Bazon en Zvíkov.

Inter la jaroj 1976-1979 li laboris kiel membro de Centra Komitato de ĈEA kaj prezidanto de la turisma sekcio. Li ofte publikigis en diversaj ĵurnaloj kaj gazetoj kaj prilaboris ĉehan - Esperantan Gastronomian terminaron.

En 1983 li antaŭtempe forpasis, venkita de gravaj lezoj post aŭto-averio, okazinta dum deĵora vojaĝo. Lian vivon rememoris la geklubanoj 23.9. kadre de la 10a PoFeRo en Písek.

Ĉeĥa Esperanto-Junularo

Nova estraro

La 1-an de septembro 2016 estis elektita nova estraro de ĈEJ: Leon Schnell-dorfer (prezidanto), Paulína Jalakšová (vicpr.), Jan Šebetovský (kasisto), Vít Mišurec kaj Tomáš Stano (komitatanoj). Kontrola grupo: Václav Zouzalík, Veronika Mihaldová a Michal Bajcar.

Miroslav Smyčka 90



Magia dato la 11-a de septembro estas ankaŭ naskiĝtago de nia ŝatata kantisto kaj honora membro de ĈEA. La 19-an de septembro li festis sian vivjubileon per koncerto en la praga teatro "U Valšů" kaj 23.9. dum la 10-a PoFero en Písek.

En aktiva aĝo li estis operkantisto en Opava, Liberec, České Budějovice kaj Ústí nad Labem, kie li rolis en operoj de Smetana, Dvořák, Fibich, Martinů, Mysliveček, Janáček, Verdi, Puccini, Gounod, Bizet, Beethoven, Mozart, Strauss, Donizetti, Čajkovskij, Mascani.

Ni esperantistoj konas lin precipe de liaj koncertoj enkadre de Internaciaj Kulturaj Festivaloj okazintaj en Ústí n. L. kaj de liaj kantistaj kontribuoj en niaj konferencoj kaj kongresoj. Li prezentiĝis ankaŭ dum pluraj UKoj, krom Prago ankaŭ en Londono, Beogrado, Roterdamo, Vieno kaj Varno ktp. Liaj kantoj aperis sur kasedo *Famaj kantoj por belaj horoj* (KAEST 1993) kaj sur duobla KD *Melodia regalo* (ĈEA 2009). Multaj liaj registraĵoj troveblas en la Muzea paĝo ĉe Ipernity en la albumoj "Muziko" kaj "Parola vorto".

<http://www.ipernity.com/home/181031>

Vivjubileoj

Ekde komenco de julio ĝis komenco de oktobro festis sian vivjubileon jenaj membroj.

Elkoran gratulon kaj multan sanon!

Miroslav Čegan, Kladno

Jiří Fanta, Strážnice

Josef Hofman, Plzeň

PhDr. Petr Chaloupka, Praha

Marcel Jelšík, Hluboká n. Vlt.

JUDr. Ludmila Komzáková, Tábor

Ing. Jiří Kortus, Blatná

Marie Linhartová, Pardubice

Ing. Rudolf Rychlý, Hradec Králové

JUDr. Jiří Šmidák, Písek

Milena Takáčová, Uničov

Karel Vala, Šumperk

Lenka Zelinková, Praha

Milada Zemanová, Pacov

Geedziĝo



Aleš Tomeček el České Budějovice, denaska esperantisto kaj teknika administranto de la ĈEA-retejo esperanto.cz, geedziĝis la 11-an de septembro kun Jana Tlapáková. Ni deziras ĉion bonan sur la komuna vivovojo!

Kun kanto ĉirkaŭ la mondo

La kompaktdiskon eldonis Ĉeĥa Esperanto-Asocio en julio 2016 ĝuste antaŭ la UKo en Nitra, kie ĝi estis unuafoje prezentita. Vi povas trovi sur ĝi entute 17 kantojn renesancajn, klasikajn kaj popolajn el la tuta mondo, kiujn bonkvalite interpretas membroj de la Sekcio de nevidantoj de ĈEA - geedzoj Jiří kaj Milena Jelínek el Jilemnice kaj geedzoj Tadeusz kaj Ivana Karaš el Kamenice n.L.



Ili ĉiuj estas finintoj de la Konservatorio de Jaroslav Ježek por viddifektitoj kaj profesiaj muzikinstruistoj en bazaj artlernejoj. Krom virinaj voĉoj vi aŭdos akompanan pianon, gitaron, bekflutojn kaj tamburojn. Kantotekstoj disponeblas en interreto. Kutima vendoprezco estas 12 Eŭroj, eksterordinara bonuso valida nur por membroj de ĈEA/ĈEJ estas nuraj 80,- CZK. La KDon vi povas aĉeti dum la ĈEA-Kongreso en Pelhřimov kaj pere de Libroservo.

*Agrablan aŭskultadon deziras al vi
Pavla Dvořáková, iniciatinto
kaj redaktoro de la eldono*

KONTAKTOJ KUN SILEZIA ESPERANTO- ASOCIO PLU EVOLUAS

Kadre de sia libertempo ĈEA-prezidanto Vladimír Dvořák kun sia edzino Pavla vojaĝis komence de aŭgusto al Vroclavo, kie ili i.a. renkontiĝis kun lokaj esperantistoj en sidejo de Silezia Esperanto-Asocio, regiona societo, fondita en 1992. Ĝi okupas tri ejojn en la str. Kosciuszki en la eksa fabrika areo, destinita por aktivecoj de civitanaj grupiĝoj. Krom amika babilado kaj kantado kun piano-akompano de Pavla okazis ankaŭ interŝanĝo ne nur de informoj kaj spertoj, sed ankaŭ de librodonacoj por la bibliotekoj de ambaŭ asocioj.



Oni traktis ĉefe pri eblecoj de kunlaboro kaj pliaj reciprokaj kontaktoj inter la membroj. Unu konkreta rezulto jam naskiĝis: partoprenantoj de la 49-a Internacia Esperanto-Feriado (la ĉefa SEA-aranĝo), okazanta nun en septembro en Duszniki Zdrój (tutproksime al la ĉeĥa landlimo) vizitos buse Litomyšl kaj Svitavy. Reciproka vizito flanke de ĈEA estos proponita por diskuto dum la kongreso en Pelhřimov. Plua tereno por kunlaboro malfermiĝas ekz. en la muzika sfero. Pri konkretaĵoj ni informos vin estonte.

Pli da informoj pri SEA vi trovos en:
<http://eo.wroclaw.pl/sea>

Venontaj UKoj

Post la tre sukcesa 101a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en la slovaka urbo Nitra, kiun partoprenis multaj ĉeĥaj esperantistoj certe interesas onin la venontaj UKoj.

La 102a UK okazos en la ĉefurbo de Korea respubliko Seulo inter la 22a kaj 29a de julio 2017. La kongresejo, Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj (HUFS), estas lokita 5 minutojn piede de metroostacio, de kiu oni povas sen linioŝanĝo atingi la centron de la urbego kontraŭ ekvivalento de proks. 1 eŭro, do pli favorpreze ol en Prago. Kaj HUFS estas tre oportuna por grandaj okazaĵoj. La ĉefa salono havas kapaciton de 2000 vizitantoj kaj estas amaso da ceteraj salonoj kaj salonetoj, do ĉiuj programeroj estos en unu komplekso. Krome, en la plej proksima ĉirkaŭaĵo troviĝas pluraj restoracioj, vendejoj kaj kafejoj.

Ĉar mi estis petata de kelkaj miaj regulaj kaj kontentaj kunvojaĝantoj, ĉu mi pretas organizi tien komunan karavanon, mi jam decidiĝis rompi mian promeson, kiun mi donis al mi mem, ke mi ne plu organizos turismajn aranĝojn kaj plu okupiĝos nur pri mia plej ŝatata hobbio, nome eldonado de libroj. Ja post miaj sep vizitoj de Koreio mi emas konfesi, ke de pli ol 60 landoj, kiujn mi vizitis, ĝi estas la plej proksima al mia koro. Tial mi jam traktas kun la vojaĝoficejo ChinaTours pri komuna organizo de flugkaravano al Koreio lige al la 102a UK. Ĝi komencos per kelktaga turisma vojaĝo tra Koreio por ekoni almenaŭ iujn el multaj pintaj interesaĵoj, kaj naturaj, kaj historiaj (plejparte registritaj kiel la kulturaj heredaĵoj de Unesko) kiujn ofertas tiu pito-

reska kaj por ni sendube ekzota lando. Por tiu parto ni havos je dispono spertan ĉiĉeronon-koreaniston de ChinaTours (same kiel dum la karavanoj al la UKoj al Pekino kaj Jokohamo). Tiun turisman parton sekvos individua partopreno de la kongreso.

Ene de la ĈEA-kongreso en Pelhřimov mi prezentos Koreion, kiel mi ekkonis ĝin dum miaj antaŭaj vizitoj, kaj certe jam havos pli detalajn informojn pri la preparata komuna vojaĝo.

En Nitro oni jam anoncis ankaŭ la lokon de la 103a UK en 2018: Ĝi estos Lisbono, la ĉefurbo de Portugalio, certe ankaŭ tre interesa loko kien valoras vojaĝi ne nur pro la kongreso.

Petro Chrdle

Zamenhof-jaro

La jaro 2017 estos jaro de jubileoj. Antaŭ **130 jaroj** estis publikigita Esperanto kaj antaŭ **100 jaroj** forpasis ĝia kreinto. UEA kaj ILEI proklamis ankaŭ **Jaron de la Lernanto**.

Kion faru lokaj grupoj, landaj kaj fakaj asocioj?

■ Prenu ekstercelajn gazetarajn komunikojn de UEA/ILEI, laŭbezzone traduku ilin kaj laŭeble aldonu iun lokan informon kaj sendu ilin al ĵurnaloj kaj radiostacioj.

■ Okazigu en Esperanto urban aŭ landan eventojn pri la temaro – kun prezentaĵoj, forumoj ks.

■ Kreu nacilingvajn materialojn kun valoro al edukistoj kaj lernantoj enlande

■ Eblo proponi kaj kunlabori kun Duolingo (aŭ similaj retejoj) pri la starigo de pliaj kursoj por eklerni Esperanton el aliaj lingvoj

Renkonto post 47 jaroj

En 1967 venis al sia korespondantino Marie Makovská proksimume dudekjara esperantisto Ronald March per aŭto de malproksima Anglio. Al Esperanto lin venigis lia panjo, kiu korespondis kun sino Břeňková el Svitavy. Ronald kune kun Marie kaj aliaj klubaninoj tiam vizitis la montaron Krkonoše, Moravian Karston kaj la urbon Olomouc.

Al sia korespondantino li petveturis el Norvegio denove en 1969. Ŝoforo, kiun li haltigis nialande, prenis lin al Brno kaj eĉ aĉetis al li veturbileton por trajno. Al Svitavy li venis en vesperaj horoj. Hazarde lin ekvidis la edzo de Marie Makovská – Ĉumová, revenante el laboro. Li rimarkis verdan stelon sur la dorsosako de la turisto, komprenis, kiu li estas, kaj venigis lin hejmen. Ronaldo poste daŭrigis petveture tra Aŭstrio kaj aliaj landoj ĝis Cejlono. Pri sia aventura vojaĝo li verkis kaj eldonis libron en sia naskolando Anglio.



Dum multaj jaroj la korespondado estis rompita. Tial Ronaldo decidis ĉi-jare viziti siajn favoratajn lokojn kaj ĉefe sian korespondantinon sen antaŭanonco. Li mem ne sciis, kiel li sukcesos. Liaj unuaj paŝoj celis al la vendejo, kie Marie tiam laboris. Sed la tempo ŝanĝiĝis. La antaŭa komerca firmao ne plu ekzistas kaj en la nuna vendejo oni ne sciis, kion li

volas. Tial li iris al la Urba Muzeo, kie li interkompreniĝis angle, kaj la muzea laboristino telefonis al Libuše Dvořáková el Esperanto-Muzeo. Ronald ekĝojis, kiam li aŭdis, ke la klubo ankoraŭ laboras kaj ĉefe, ke li post preskaŭ kvindek da jaroj denove renkontiĝis kun Marie. Li pasigis tri agrablajn tagojn inter esperantistoj kaj denove revidiĝis kun la familio de Marie.

Libuše Dvořáková

Ĉeĥa Fervojo pri Esperanto-muzeo

Ĉeĥa Fervojo en sia portalo Railjet por tabelkomputiloj kaj saĝtelefonoj de pasaĝeroj propagandas ankaŭ Esperanto-Muzeon en Svitavy. La servo funkcias nur en trajnoj.

Manĝokarto en Esperanto

En la praga restoracio "U Skřetů" eblas ricevi manĝo-karton en Esperanto, kvankam la kelneroj ne parolas la lingvon. Iniciato de la klubo E-mentál Praha.



Artikolo pri Wikipedia kun mencio pri Esperanto

La 11-an de aŭgusto 2016 aperis en la gazeto Instinkt granda artikolo pri Wikipedia. Dua ĉapitro parolas pri traduko de la ĉeĥa versio el Esperanto kaj prezentas kelkajn opiniojn de la tradukinto M. Malovec.

Karel Havlíček Borovský (1821-1856)

La 160-a datreveno de forpaso de la aŭtoro de *La bapto de caro Vladimir*

III-a parto

Baldaŭ al li povis alvenadi lia edzino kun malgranda Zdena. La familio en Briksen ne suferis de malriĉeco, ĉar Havlíček ricevadis monate monon de ŝtato (500 florinojn, tio estis tiel granda monsumo, kiel salajro de aŭstra oficisto). Li eĉ havis purigistinojn kaj manĝis manĝaĵojn el luksa hotelo „Zum Elefant“ („Ĉe Elefantoj“).

Sed li en Briksen suferis psiĉe, ĉar al li mankis kontaktoj kun ĉeĥoj, amikoj kaj inter vizitoj de lia edzino ankaŭ kun familianoj. Lia edzino suferis de tuberkulozo kaj ankaŭ Havlíček de ŝi infektiĝis. Li povis forlasi Briksenon nur post promeso, ke li ĉesos ĵurnalistan laboron (1855). Por la redaktoro estis la promeso tre humiliga, sed li faris tion, por baldaŭ renkontiĝi kun siaj edzino kaj filino.

Kiam li revenis en Bohemion, li eksciis, ke lia edzino jam mortis de tuberkulozo kaj estas entombigita. Li ne devis eldoni ĵurnalojn kaj multe da eksaj amikoj lin evitis.

Printempe 1856 li malsaniĝis de tuberkulozo kaj la 29-an de julio 1856 mortis. La 1-an de aŭgusto 1856 li estis en Prago entombigita. Multe da homoj lastfoje adiaŭis lin, sed ili tiel timis la policon de Kempen, ke neniu el ili aŭdacis paroli pri Havlíček. Plej brave agis ĉeĥa verkistino Božena Němcová (1820?-1862), kiu donis en liajn manojn mirabilon kaj ornamiis lian ĉerkon per laŭra krono kun dornoj. (Ŝi ne estis pro tio punita, sed ŝia edzo Josef Němec estis admonita.)

Filino Zdena loĝis en familia domo en Německý Brod, kie ŝi mortis de tuberkulozo kiel 24-jara needziĝiniga virino en la jaro 1872.

Karel Havlíček Borovský estis estimata jam dum sia vivo. Homoj kaŝe legis precipe liajn tri grandajn satirojn: „La reĝo Lávra“ („Král Lávra“), „Tirolaj elegioj“ („Tyrolské elegie“) kaj „La bapto de caro Vladimir“ („Křest svatého Vladimíra“).

Motivo de „La reĝo Lávra“ estas transprenita el irlanda fabelo: la reĝo Lávra, kiu havas longajn, azenajn orelojn, kaŝas ilin sub sia longa hararo kaj ordonas ekzekuti siajn barbistojn, por ke neniu eksciui lian sekreton.

En „Tirolaj elegioj“ Havlíček humure priskribis sian deportadon.

En ambaŭ satiroj li trafe mokis absolutismon. Sed la plej grava satiro estas „La bapto de caro Vladimir“. Mi tralegis ĝin en Esperanta traduko de Tomáš Pumpr. Havlíček konis tekston de la malnovrusa kroniko de Nestor. En la jaro 988 rusa princo Vladimir, kiu akceptis kristanan kredon de greka ortodoksa eklezio, ordonis faligi statuon de la pagana dio Perun (dio de la fulmotondro), ligi ĝin al la vosto de ĉevalaĉo kaj ĵeti en la riveron Dnepro.

En la poemo de Havlíček eĉ Dio estas nur cara servisto. Li ne volas tondri dum cara festo anstataŭ artilerio kaj elpelas cargardiston. Tial li estas juĝita de armea tribunalo. En absolutisma ŝtato eĉ Dio povas esti juĝita. La Dio kaj ateisto (ĵurnalista) estas kondamnitaj al la sama puno: morto en la rivero Dnepro.

Post morto de Perun en Ruslando ekestas sendieco kaj eklezianoj petas la caron doni al ili novan dion. Al absolutisma reĝimo taŭgus ĉiu, kiu kapablu timigi kamparanojn, por ke ili silentu kaj laboru por la caro.

Havlíček en sia satiro ne mokas bonajn kredantojn, sed absolutismon kaj ĉiujn ruzulojn, kiuj el naiveco de aliaj kreis bonegan metion por si mem. Diversaj eklezioj volas plenigi vakantan lokon post Perun kaj kalumnias unu la alian.

La satiro ne estas finita, sed tio ne malgrandigas ĝian signifon. Trompisto kaj hipokritulo troviĝas eĉ en la 21-a jarcento. Alkoholismo neniigas vivojn de homoj ne nur en Ruslando, sed ankaŭ en nia lando. Naivuloj denove serĉas „helpon“ oriente. Super Ruslando nun denove regas iu Vladimir. Nur nova Havlíček Borovský al ni trege mankas.

(fino)

Oldřich Arnošt Fischer

Ĉantorio 19.6.2016



EK Ŝumperk

La 13-an de julio 2016 la klubo festis vivjubileon de klubanino.



Madagaskaro



Malgraŭ malbonaj vivkondiĉoj pro politika krizo, Esperanto floras. RABEVAZAHA Désiré
desirerabevazaha@gmail.com

Ni kondolencas



La 5-an de aŭgusto 2016, post plurjara kuraĝa batalo kontraŭ grava malsano, forpasis Věra Muchnová (nask. 1955) el Strakonice. En ĈEA ŝi membriĝis en 1974; origine aktiva membrino de E-klubo en Strakonice, ekde 2006 ĝis 2011 vicprezidantino de klubo "La Ponto" Písek.

Ŝi organizis Postferiajn renkontiĝojn en Strakonice en 2007 kaj 2008 kaj tradukis ĉiĉeronan tekston pri la burgo Strakonice kaj tiea muzeo, kiu estas surloke oficiale havebla. Ŝi kontribuis al Vikipedio kaj Informilo de AEH. Kun J. Werner ŝi tradukis la libron *Metamorfozoj* de Věra Nosková (eld. Brno 2015) kaj rakonton *Hejma ĉikanado - pri suferigado de viro* de la sama aŭtorino.

DETLEV BLANKE (1941-2016)



D-ro Detlev Blanke, unu el la plej renomaj nuntempaj interlingvistoj, forpasis la 20-an de aŭgusto en Berlino (nask. la 30-an de majo 1941). Esperanton li lernis memstare en 1957. Li doktoriĝis en 1976 per disertacio pri kompara vortfarado de Esperanto kaj la germana, kaj akiris docentan diplomon en 1985 per disertacio pri planlingvoj. En 1988 li fariĝis docento pri interlingvistiko en la Berlina Humboldt-Universitato, kie li prelegis ĝis 2007.

Blanke estis sekretario de Centra Laborrondo Esperanto en la Kulturligo de

Germana Demokratia Respubliko 1968-1980 kaj ekde 1981 de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, kiu en 1991 unuiĝis kun Germana Esperanto-Asocio. Kiel sekretario li ankaŭ redaktis la revuon *der esperantist*. De 1974 li estis estraro de Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), kies bultenon Informilo por Interlingvistoj li redaktis ekde 1992. De 1992 ĝis 2013 li kompilis (kun H. Tonkin) bibliografion pri Esperanto kaj interlingvistiko por la usona Modern Language Association.

Unu el la iniciatoj de Blanke estas la Esperantologiaj Konferencoj, okazantaj en ĉiu UK ekde 1978. Li organizis ĉ. 20 el ili kaj redaktis la aktojn de pluraj. En 1991 Blanke kunfondis Gesellschaft für Interlinguistik (Societo por Internacia Lingvo; GIL). Li estis ĝia prezidanto ĝis 2011 kaj redaktis ĝian bultenon kaj la aktojn de multaj GIL-konferencoj.

Blanke regule partoprenis en KAEST-oj en Ĉeĥio kaj Slovakio kaj lia libro pri interlingvistiko aperis ankaŭ ĉeĥlingve.

La bibliografio de liaj publikaĵoj ampleksas pli ol 1200 unuojn. Kun sia edzino Wera li laboris i.a. pri terminologio kaj iniciatis la fondon de Terminologia Esperanto-Centro de UEA en 1987. Pro meritoj en la terminologia kampo ambaŭ estis premiitaj de Infoterm per la Eugen-Wüster-Medalo en 2006. Pro sia interlingvistika agado Blanke ricevis ankaŭ la estonan premion Academicus Paul Ariste.

Detlev Blanke estis komitatano de UEA 1978-1998 kaj juĝanto pri eseoj por la Belartaj Konkursoj de UEA ekde 1980. En 2011 li estis elektita Honora Membro de UEA.

*laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA
foto el Vikipedio*

REINHARD SELTEN (1930-2016)

La 23-an de aŭgusto Esperantujo perdis sian plej eminentan scienciston, laŭreaton de **Nobel-premio**.



Prof. d-ro Reinhard Selten naskiĝis la 5-an de oktobro 1930. En 1961 li doktoriĝis pri matematiko en la Goethe-Universitato de Frankfurto-ĉe-Majno, kie en 1968 li akiris docentan diplomon. En la studjaro 1967-1968 li estis gastprofesoro en la Universitato de Kalifornio en Berkeley. Li estis profesoro en la Libera Universitato de Berlino 1969-1972, en la Universitato de Bielefeld 1972-1984 kaj ekde 1984 en la Universitato de Bonn. De 2006 ĝis 2014 li gvidis esplorprojekton pri eksperimenta ekonomiko de la Nord-rejna-Vestfalia Akademio de Sciencoj kaj Artoj. Dek unu universitatoj asignis al li honoran doktorecon.

En oktobro 1994 Selten fariĝis, kun du usonaj ekonomikistoj (John Nash kaj John Harsanyi), laŭreato de la Nobel-premio pri ekonomiko pro sia elstara kontribuo al la ludoteorio. Krom pri ludoteorio, Selten faris pioniran esploradon pri eksperimenta ekonomiko kaj pri limigita racieco. En lia ampleksa scienca bibliografio, ĉefe en la germana kaj angla, troviĝas ankaŭ la verko *Ĉu mi lernu Esperanton? Enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj* (1982; 2-a eld. 1995), kunaŭtorita kun Jonathan Pool.

Pri sia esperantistiĝo Selten mem rakontis jene: "Mi komencis lerni Esperanton kiel 17-jarulo aŭtodidakte. Fakte, mi vidis kaj legetis Esperantolibron jam pli frue en Breslau, kie mi

vivis ĝis februaro 1945. Mia patro estis esperantisto, sufiĉe aktiva en la blindula Esperanto-movado. Tamen, la lingvon mi eklernis ne sub lia rekta instigo, nur sufiĉe longe post lia morto." En Frankfurto (ĉ. 1960) Selten ekzameniĝis kiel Esperanto-instruisto kaj estis vicprezidanto de la loka klubo. Li konatiĝis kun sia edzino pere de Esperanto kaj instruis la lingvon ankaŭ al sia pli juna frato. Li estis, same kiel la edzino, dumviva membro de UEA ekde 1969 kaj membris ankaŭ en Germana Esperanto-Asocio kaj Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS). En la 84-a UK en Berlino (1999) li estis rektoro de la Internacia Kongresa Universitato.

Sub la redaktora nomo de Selten aperis la diverslingve eldonita studkolekto *La kostoj de la eŭropa lingva (ne)komunikado* en 1997. Kun Helmar Frank li publikigis la libron *Für Zweisprachigkeit in Europa; Por dulingveco en Eŭropo* (2005). En la Eŭropa Parlamento Selten pledis por Esperanto kiel invitita parolanto la 9-an de majo 2007, okaze de la 50-jariĝo de la Roma Traktato. En la eŭropaj elektoj en 2009 li estis la ĉefkandidato de la germana sekcio de la partio Eŭropo-Demokratio-Esperanto.

En la 80-a UK en Tampere en 1995 Reinhard Selten estis elektita kiel membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. En 1996 li partoprenis ankaŭ en nia UK en Prago, kie li prelegis pri la ludoteorio.

Paul Gubbins (1949-2016)

forpasis la 6-an de aŭgusto. Li estis redaktoro de la gazetoj *Monato* kaj *La Brita Esperantisto*, aŭtoro de lernolibro *Kunvojaĝu*.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, Vikipedo

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vr. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio
- 80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

Heroldo de Esperanto vendita

Fabricao Valle kaj Paulo Lima, partneroj en la entrepreno Sociala Grupo Lexus (Brazilo), eldonos la gazeton *Heroldo de Esperanto* ekde la jarkolekto 2017. Kooperativo de Literatura Foiro, vendinte la gazeton al la supre menciitaj, responsas ankoraŭ pri la tuta jarkolekto 2016 de *Heroldo de Esperanto*. La agentoj kaj distribuantoj bonvolu atendi de Lexus komunikon pri la posta jaro.

La vendo ne koncernas la rajtojn pri la libroj: la rajtoj restas ĉe LF-koop kaj Itala Interlingvistika Centro. Tio interalie koncernas la verkon *Paŝoj al plena posedo* kaj ceterajn lernolibrojn.

Laŭ Heroldo Komunikas

Por nova mondo, nova Heroldo

Heroldo havos 10 ĉeftemojn, sub kiuj oni redaktos ĉiuspecajn materialojn por ĝi, nome reportaĵojn, artikolojn, kajerojn, rubrikojn kaj aŭtorajn kolumnojn.

- **Agado per Esperanto: Tria sektoro en Esperanto**
- **Agado por Esperanto: la E-movado**
- **Junulara Vivo**
- **Edukado**
- **Politiko**
- **Ekonomio**
- **Scienco kaj Teknologio**
- **Kulturo kaj Arto**
- **Sportoj**
- **Lingvoj**

*laŭ prezento de
Fabricio Valle kaj Paulo Lima*

Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
47. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto

Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:

p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice,
vratislav.hirs@esperanto.cz,
tel. 517 444 117

Uzávěrka příštího čísla: 15.11.2016

Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
47-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva numero:
15.11.2016

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

KALENDARO 2016

2016-10-03/09 Seminario en Skokovy

Info:drahotova@esperanto.cz

2016-10-13/16 La 16-a ĈEA-Kongreso

en Pelhřimov, Info: ces@esperanto.cz

2016-11-03 Omaĝo al Jiří Karen I Prago

2016-12-01 Omaĝo al Jiří Karen II Prago

2016-12-04 Marcipana Kristnasko

Info: svitavy@esperanto.cz

2016-12-10 Antaŭkristnaska renkontiĝo

en Písek, Info: pisek@esperanto.cz

ARANĜOJ EN NAJBARAJ LANDOJ

2016-11-11/13 [Esperantista renkontiĝo GRUPE 19](#) - en Gliwice (Pollando)

Info: stanislaw.mandrak@gmail.com

2016-1-17/20 [KAEST - Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko](#) - en Modra-Harmónia, Slovakio. Ĉefa temo:

Avantaĝoj kaj obstakloj
de moderna komunikado.

Info: kaest@ikso.net

2016-12-03 [Antaŭkristnaska kolbasumado en Saksio 2016 \(Stolpen, Germanio\)](#)

Info: e-mentalprago@seznam.cz

2016-12-17/18 [4-a Granda lokŝumado en Bratislavo](#), Info: e-mentalprago@seznam.cz

2017-01-5/8 [XXXV. Poludnica](#) en Malaltaj Tatroj, Slovakio

Ĉefa temo: geokaŝado.

Info: poludnica83@gmail.com

**Konferenco pri Aplikoj de Esperanto
en Scienco kaj Tekniko**



17.-20.11.2016. Modra, Slovakio
<http://kaest.ikso.net>

Venu ankaŭ vi - ĝui sciencon en Esperanto!



ĈEA-prezidanto Vladimír Dvořák kun vroclovaj esperantistoj



Matena gimnastika dum la 19a Renkontiĝo de ekstendaranoj en Lančov



Delegacio el Ĉinio post la solena akcepto en la urbodomo de Svitavy



Danko al helpantoj de la 101-a UK en Nitro



Partoprenantoj de la Antaŭkongresa Ekskurso antaŭ la fabriko Adfors en Litomyšl



Teatro DOMA el Svitavy en UK Nitro: El la vivo de insektoj